Raporto pri la
**Trinkakvo-projekto 2a/2014 por Kalima**

Konkretigho de la projekto : 2014-11-13 ghis 2015-01-27
Loko: kvartalo CAMP CENTRAL, Kalima, Maniema Provinco en RD Kongo
Organizajho kiu konkretighis la projekto : Kamparana Solidareco
Projekto : Trinkakva alirigo
Subtenantoj: WKV AG (Germanio), Stiching Voor Internationale Komunikatie (Nederlando), Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), s-ino Betty
Monkvanto por la projekto : 10 mil euroj.
Profitantoj de la projekto : 800 familioj, chirkau 3000 homoj, loghantaj en Camp Central, Camp Famille kaj parteto de la avenuo Mapendo kaj Kiswakal.

**Pri la projekto :**
Por solvi la trinkakvan problemon je kiu suferas la enloghantoj de Kalima (entute 136.000) la kooperativa asocio PIEADC (Kamparana Solidareco) iniciatis projekton, kiu estas prilaborata en pluraj partoj, lau la financaj eblecoj.

La unua projekto en 2013 ricevis 3.000 euroj de WKV AG donis akvo-provizon por ghis 1000 homoj kaj malgranda malsanulejo.

Per la ricevita financado de 10mil Euroj Kamparana Solidareco (**KS**) achetis materialojn: plastaj kaj feraj tuboj, genutuboj, kranoj, cemento, shtoneroj, pagis la metiistojn, ktp. (vidu la tabelon).

Kamparana Solidareco esploradis la lokon de kie venos la akvo kaj elektis la akvo-stacion OMARI CHAMI, kaj la vojon de la tubo, kiu preterpasas la Gheneralan Hospitalon ghis Camp Central kie estos la kranaro.
Tie kushis ankorau malnovaj tuboj de la societo SOMINKI. La malnovaj laboristoj de SOMINKI indikis nin la lokojn kie kushis la tuboj. Dank'al tiu laboro KS kapablis kalkuli la koston kaj la bezonojn de la projekto (kiom da tuboj necesas kaj kiaj tuboj ktp). Verdire se ne estus kelkaj tuboj bonstataj, la projekto ne eblus, char la distanco estas pli longa ol antauvidis KS.
KS petis la sanoficejon por analizi la kvaliton de la akvo ; ghi estis pozitiva.
Tiu laboro okazis dum dek tagoj.

KS achetis materialon (piochoj, shuoj, tranchiloj, shpatojn, ktp) por ebligi la fosadon kie kushos la tubojn. Tiun laboron kaj la surlokan transport-laboron faris kelkaj dek junuloj. Ili ricevis manghadon kaj kelkaj moneroj, ekzemple por sapo.
Ankau achetitaj en Goma estis cemento, tuboj genu-tuboj, kranoj, kranvalvo, gluajho, teflono, niploj, mufo ktp.. Bedaurinde ne eblas acheti tiujn varojn en Kalima, kaj la aviadila transporto estis multekosta. La materialo estis achetita de nia kara Alphonse WASEKA kiu loghas en Goma.
La fosado dauris dum la tuta projekto, char tuj post la fosado venis la ligado de la tuboj. Fakte la tubojn ni instalis en la arbaro. Kashante ilin en la tero kauzis detruadon je la kultivajhoj de kamparanoj.

Por certigi la funkciadon la teknikistoj ligis la tubojn kiuj jam enhavis la akvon.

La kvina etapo konsistis el la disigo de la akvo inter la Ghenerala Hospitalo kaj Camp Central. Laboris chefe la teknikistoj. Tiu laboro kiu dauris du tagoj, permesis al ni malkovri ke,  la malnovaj tuboj instalitaj siatempe de SOMINKI jam havas malpurajhon kie ankau kolorighas la elfluantan akvonen. Do pro tio, necesas trovi solvon. Ni achetis kelkajn novajn tubojn por eviti malsanojn.

La sesa etapo konsistis je la fosado de lokoj por enterighi la tuboj ghis la fina loko kie ni muntis 6 kranojn sur unu soklon en Camp Central. La teknikistoj petis observi dum 21 tagoj antau la konektado de la tuboj al la  kranaro.
Ni nomis la kranaro «BETTY» char inter la subtenintoj ni havas unu sola virino Betty. Kaj estas ghenerale en Afriko ke virinoj suferas, zorgante pri la familioj.

Finfine, je la 27a de januaro 2015 okazis la solena ekfunkciado de la projekto. Partoprenis la kvartalestro de Camp Central. Ghoje okazis tiu ceremonio.
Entute la projekto dauris tri monatoj.

**Teknika agado :** Por la konkretigho de tiu projekto,  KS  kunlaboris kun plumbistoj, masonistoj. Pri la plumbado, ni havis du plumbistojn. Ilia sperto helpis nin samtempe enteri la tubojn progresante kun la akvo elfluado.
Ni renkontis problemon char la akvo ne fluis mezstrate. Necesis fosi pli profunde. Du masonistoj kaj iliaj kvar helpantoj konstruis la krudan fundamenton por la kranara soklo. La muroj estis konstruitaj per fero kaj pavumitaj.
KS metis tabulon pri la projekto.

**Pri la akvo:** Unue ni renovigis la akvo-stacion OMARI CHAMI kaj  plifortigis la pompon kiu alirigas la Gheneralan Hospitalon de Kalima. Tiu stacio OMARI CHAMI antaue ne funkciis. Dank'al tiu projekto, ghi provizas akvon por la hospitalo kaj enloghantoj de CAMP CENTRAL, KiswakaI, Camp Famille, Avenuo Mapendo ankau kelkaj aliaj en mallonga distanco havas akvaliron.
Ni  kalkulis 800 familiojn au 3000 homoj kiuj profitas de tiu projekto sed hodiau ni komprenas ke ankau la plej proksimaj najbaroj prenas tie akvon.

**Problemoj :**  90 procentoj de Kalima enloghantoj alfrontas la trinkakvan problemon. Instalante la akvon en CAMP CENTRAL multaj enloghantoj de Kalima demandas sin kial nur en CAMP CENTRAL. Kial ne en nia loko? Do kelkaj homoj jaluzante la enloghantoj de Camp Central ekinsultis KS.
Sed KS jam planas plian akvo-projekton.

La transporto de materialoj multe kostas char oni achetas materialojn en Goma kaj transportas aviadile. Ni esperas ke estonte eblos acheti cemonenton ktp. En Kalima – au transporti ilin per kamiono.

**Estonteco :**
Nia sekva projekto estos provizi Kalima Centro per trinkakvo. Tiu projekto kostus  80.000euroj alirigi Kalima Centro je trinkakvo. Ni estas eta asocio sed kun konvikego konkretighi gravajn aferojn se ni havas ech subteneton.

**Financa raporto :** entute la dua akvo-projekto ricevis financan helpon de 10 mil Euroj = 11671 USD

| | Destino | Kosto |
|---|---|---|
| 1 | Materialo : plastaj kaj feraj tuboj, genutuboj, niploj, glujajho, kranoj, | 5724 |
| 2 | Materialoj por la masonado : brikoj, sablo, shtonetoj, lignajho, fero | 1226 |
| 3 | Transporto de materialo, inter Goma kaj Kalima | 1980 |
| 4 | Manlaborado : plumbisto kaj masonistoj | 1500 |
| 5 | Nutrado por volontuloj dum 20 tagoj | 600 |
| 6 | Sanoficejo | 30 |
| 7 | Luado de la fotilo – estonte propra fotilo shparos monon | 50 |
| 8 | Solenajhon | 100 |
| 9 | Interreto | 64 |
| 10 | Transporto Alphonse en Goma dum la achetado | 40 |
| 11 | Banko-kostoj, egalas 3 % je la depreno el la konto | 348 |
| 12 | Sume<br>Restas: | 11662<br>9 |

**Dankon :**
La trinkakva projekto pluiris sukcese kaj ni sincere dankas la kontribuintojn: s-ino Betty, Stiching Voor Internationale Komunikatie (dank' als Hans kaj Ans Bakker), la firmao WKV AG,  Asocio de Verduloj (AVE), kiu organizis la kolekton de la mono.
Vi – la donacintoj - permesis ke hodiau en Kalima en plia kvartalo  bona trinkakvo akvo ekefluas el kranoj. Neniu tion imagus iam.
Sed la bezono restas grandega ; kaj ni esperas ke pasho post pasho iam la tuta urbo havos akvo-provizon. Kompreneble ni esperas ke daure vi estos kun Solidareco Kamparana/PIEADC por felichigi Kalima enloghantoj.


| Por Solidareco Kamparana / PIEADC | Por Asocio de Verduloj Esperantistaj / AVE |
|---|---|
| Etienne KATCHELEWA KANDOLO, Prezidanto.<br>Senprofita organizo KAMPARANA SOLIDARECO<br>Kalima, Maniema/RDKongo.<br>Av. Kamisuku II, Kvartalo Munyangi, Urbo: Kalima,<br>Teritorio de Pangi, Provinco : Maniema/RD Kongo<br>Tel : +243 998735042, +243 998735649<br>Retadreso : pieadc2006@yahoo.fr<br>www.kamparanasolidareco.weebly.com | Dr. Manfred Westermayer, sekretario<br><br>manfred@westermayer.de<br><br>www.verduloj.org |

Sekvas kelkaj fotoj :


La inauguro de la akvo-projekto Camp Central



Subtenantoj: WKV AG, Stichtig voor Kommunikatie, Betty, AVE


La kran-aro Betty


Ligi la tubojn


Preparo por la fosado


La libervolaj junuloj kiuj fosis kaj helpis je aliaj laboroj